

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

mardon, la 11-an de Julio, 2017 • numero ok

Hodiaŭ

- ★ 7:15 atm: Matenmanĝo
- ★ 8:30 – 12:15 ptm: Lecionoj
- ★ 12:30 ptm: Tagmanĝo
- ★ 1:00 – 2:00 ptm: **KTF provludo: koruso** – Atentu: tiu estos la lasta provludo antaŭ la koncerto. La koruso kantas ĉiujn kantojn senpaŭze por taksu, kiom da tempo necesos dum la koncerto
- ★ 2:00 – 3:00 ptm: Hoss FIROOZANIA prelegos pri “**Kiel klasifiki Esperanton laŭ lingvosciencaj principoj?**”
Flowe 110
- ★ 3:15 ptm: Alekso MILLER diskutos la presadon de siaj infanlibroj kaj **kiel publikigi ion malmultekoste**
Flowe 110
- ★ 4:30 – 5:30 ptm: **KTF provludo: instrumentistoj** – Atentu: tiu estos la lasta provludo antaŭ la koncerto. Oni devos ludi ĉiujn programerojn senpaŭze por taksu, kiom da tempo necesos dum la koncerto
- ★ 5:30 ptm: Vespermanĝo
- ★ 7:00 – iam ptm: **Distra vespero:** Kelkaj NASKanoj distros nin per amuzaj rakontoj, muziko, dancado, kaj la historia kvizo “Kviztorio” Teatro, ĉefa konstruaĵo (*Main*)

Andrew XU perdis sian vortaron. Ĝi estas la vortaro de Wells, kaj ĝi havas “AX” sur la unua paĝo. Se vi trovos, bonvolu doni al li.

Interkona ludo inter la klasoj

La listo de interesaj “sekretoj” pri la NASKanoj estas sur la tablo en *Finley*. Ne maltrafu la okazon ekkoni novajn amikojn, kiujn vi eble ne jam renkontis.

Kiel klasifiki Esperanton laŭ lingvosciencaj principoj?

jen priskribo de la prelego, kiun Hoss FIROOZANIA prezentos hodiaŭ

La prezentaĵo estos eltiraĵoj el la prelego originale prezentita al universitataj studentoj de lingvoscienco, por klarigi al ili, kiel Esperanto similas al (kaj diferencas de) aliaj lingvoj. La enhavo rilatas ĉefe al la nerda lingvosciencia subfako nomita *morfologio* (vortostrukturo), sed la konceptoj estas esence facilaj, kaj mi klarigos ĉiujn fakajn terminojn.

NASKa bluso

jen kanto, kiun ni aŭdos en la distra vespero hodiaŭ

Ho ve, mia kara,	Mi preskaŭ svenas, mia kara,	Ho ve, mia kara,
La verdan splenon havas mi!	Trafas min la verda splen'!	La verda spleno trafas min!
Bedaŭrinde, mia kara,	Ho domaĝe, mia kara,	Ho terure, mia kara,
La verdan splenon havas mi!	Trafas min la verda splen'!	La verda spleno trafas min!
Rapide pasis la kursaro,	Pri multaj temoj mi eksciis,	Ŝajne NASK jus komenciĝis,
Kaj ne revenos ĝis juli'	eĉ pirato sen gluten'!	kaj jam ni venas al la fin'.

Kelkaj antaŭforiraj anoncoj Some announcements before leaving

(English version follows)

- **Bonvolu purigi kaj remeti ĉiujn tasojn de la kuirejo ĝis tagmezo en merkredo.** Ni konservos la kolekton por la NASKanoj de 2018. Se vi ne remetos la tasojn, estos malpli por la venontjara grupo. Ne lasu tason en via ĉambro – la universitato forigos ĝin.
- **Se vi pruntis libron de la ĉareto en Flowe, bonvolu remeti ĝin ĝis tagmezo en merkredo.** Tiuj ĉi libroj iros en la bibliotekon de WPU post nia foriro kaj estos parto de la daŭra kolekto tie. La librojn aĉetis ESF ĝuste por tiu ĉi celo.
- Metu la tukojn ekster vian pordon. **Donu vian enirkarton kaj ŝlosilon al Ellen en ĉambro 107 aŭ enmetu ilin sub ŝian pordon.**
- **Please wash and return the cups from the kitchen by noon on Wednesday.** We'll keep this collection for NASK participants in 2018. If you don't return the cups, there will be fewer for next year's group. Don't leave a cup in your room – the university will get rid of it.
- **If you borrowed a book from the cart in Flowe, please return it by noon on Wednesday.** These books will go to the library of WPU and be part of the permanent collection there. The books were purchased by Esperantic Studies Foundation specifically for this purpose.
- Place your sheets, blanket and towels outside your door. **Give your entrance card and key to Ellen in room 107 or put them under her door.**